Friedrich Wilhelm Weber,

Dreizehnlinden, Kapitel 3, Auf dem Habichtshofe

1.

1 Elmar, Herr vom Habichtshofe,
Sprach zu seinem Jagdgesinde:
“Gute Meute, gute Beute;
Hängt den Bären an die Linde!

2 Achtet auf das Waidgeräte
Und besorgt die müden Hunde,
Dann euch selbst; mich will bedünken,
Daß euch wohl der Imbiß munde.

3 Drauf zerwirkt den braunen Riesen,
Aber mit geschickten Händen!
Schont den Pelz; nach Bodinkthorpe
Will ich ihn zum Grafen senden.

4 Dem der ungeschlachte Brummer
Jüngst die Heimkehr abgeschnitten,
Als der Alte mit der Tochter
Spät vom Eschenberg geritten.

5 Heute fand er seinen Meister!
Stolzer Bursch, er schlug sich wacker,
Bis ihm an der Gurgel hingen
Greif und Kneif, die grimmen Packer.

6 Traun, ich hätt’ ihn laufen lassen,
Ihn, den Herrn von Wald und Heide,
Doch dem Wegelagrer stieß ich
Rasch ins Herz die blanke Scheide.

7 Mocht’ er sich mit Männern zerren,
Mocht’ er sich mit Hunden necken:
Allzu bärenhafte Laune
War’s, ein Mädchen zu erschrecken.“

. . .

Friedrich Wilhelm Weber,

Dektritilio, ĉapitro 3, Sur la Akcipitra korto

tradukita de Manfredo Ratislavo

1.

1 Diris la sinjor’ Elmaro
al ĉasista aro sia:
”Vi pendigu la ĉasaĵon
al la arbo, la tilia!

2 Zorgu por la ĉasilaro
kaj la hundoj“, li admone
diris, ”poste vi mem manĝu,
la manĝaĵo gustas bone.

3 Lerte tiam tiu urso
estu de vi distranĉota,
ke la fel’ ne difektiĝu,
estu ĝi al graf’ sendota.

4 al la grafo minacita
de ĉi tiu best’ survoje,
kiam tiu kun filino
sia hejmen rajdis foje.

5 Mi hodiaŭ venkis tiun!
Brave ĝi ja sin defendis
kontraŭ mia hundoj, kiuj
al ĝi ĉe la gorĝo pendis.[3]

6 Mi ja estus domaĝinta
lin, la reĝon de l’ arbaro,
sed tranĉile mi mortigis
lin pro lia malbonfaro.

7 Se kun viroj aŭ kun hundoj
ja batalus li pro io:[4]
Sed timigi knabineton,
tro kaprica estis tio!”

. . .

[3] aŭ: morde ĉe gorĝ’ lia pendis.
[4] aŭ: batalintus li pro io:

8 Elmar grüßte mit der Lanze
Und, gefolgt von Waidmannsrufen,
Sprang er aus dem Kreis der Jäger
Schnell hinan des Saales Stufen.

8 Salutinte per la lanco
Suprensaltis nun Elmaro
al la halo, dum sonadis
vokoj de la ĉasistaro.

9 Höher hob sich heut des Jünglings
Breite Brust vom frischen Gange,
Heller war sein blaues Auge,
Voller dier gebräunte Wange.

9 Plie nun la brusto larĝa
levis sin de la junulo,
estis ruĝa lia vango
kaj pli hela la okulo.

10 Schüttelnd die betauten Locken,
Schritt er durch die große Halle,
Fast erschreckt vom düstern Schweigen
Und des Schritts verlornem Schalle.

10 Kapskuante siajn buklojn
paŝis li tra l' halo ombra,
timetigis liaj paŝoj
lin en la silento sombra.

11 Wo sich einst die schildgewiegte
Falkenbrut des Spiels erfreute,
Stand am kalten Herd des Hauses
Letzter Sproß vereinsamt heute.

11 Kie iam en la domo
ludis la idar' petola,
tie ĉe l' malvarma forno
staris li nun tute sola.

12 Um ihn her, an düstern Wänden
Wisenthörner, Hirschgeweihe,
Bärenschädeel, Schwert und Lanze,
Helm und Brünne, Reih' an Reine.

12 Ĉirkaŭ li, ĉe sombraj muroj,
urskranioj kaj ĉasiloj,
cervkornaroj, bizonkornoj,
granda aro de armiloj.

13 Eichne Säulen, eichne Sparren,
Eichner Boden, eichnes Schauer:
All ein Wald, doch still und öde,
All ein Wald in Wintertrauer.

13 Kverkaj vandoj, kverkaj traboj,
kverka planko estis tie,
kiel en arbar' soleca
vintra tristo regis ĉie.

2.

2.

14 Wo die Brucht durch Schilf und Erlen
Rieselt und zum Drosselsange
Dunkle Runenlaute murmelt,
Lag der Hof am Hügelhange.

14 Kie fluas tra fragmitoj
kaj fraksenoj rivereto
murmuranta ion, kuŝis
la kortdomoj ĉe monteto

15 Unter Linden, unter Ulmen
Und des Strohdachs warmen Schwingen,
Die, mit Lauch und Moos bewachsen,
Breit und schirmend niederhingen.

15 sub tilioj kaj sub ulmoj,
kun la larĝaj pajltegmentoj
musk-kovritaj, kiuj ŝirmis
kontraŭ ĉiuj fortaj ventoj.

16 Bau an Bau. Von bunten Giebeln
Nickten nach dem Brauch der Alten
Holzgeschnitzte Pferdeköpfe,
Wicht und Kobold fernzuhalten.

16 Estis ĉevalkapoj lignaj
sur la gabloj de la domoj,
laŭ la moro de l' praavoj,
por deteno de la gnomoj.

. . .

. . .

17 Weit erstreckten sich des Hauses
Kämpe, Wälder, Ackerbreiten;
Bergesfirst und rinnend Wasser
schied die Mark seit Väterzeiten. -

18 Als der Wandersturm vom Osten
Über Deutschlands Felder brauste,
Volk auf Volk wie Meeresflutener
Zornig durcheinanderzauste;

19 Als die harten Bernsteinfischer
Welschlands dunkle Trauben pflückten,
Und des Spessarts rauhe Jäger
Sich mit Römerringen schmückten:

20 Unentwegt auf freier Hufe
Grundentsprosssen, grundverwachsen,
Wurzelfest wie seine Eichen
Saß der edle Stamm der Sachsen.

21 Stetig bauten sie die Scholle,
Hüteten auf brauner Heide
Sorgsam Bien' und Schaf und zogen
Rind und Roß auf Trift und Weide.

22 Übten wie die Väter taten,
Sprung und Wurf und Lanzenbrechen
Oder griffen rasch zum Eisen,
Freveltat und Schimpf zu rächen;

23 Brauten Met und zechten tapfer,
Trotztene auf der Jagd den Wettern,
Und am heil'gen Opferkessel
Dienten sie den alten Göttern.

24 Stetig auf dem Habichtshofe
Unter ihres Saales Balken
An derselben Feuerstätte
Hausten, Sohn auf Sohn, die Falken,

25 Ehrenreich und unverworren,
Bis am Rhein der Brand erglühte,
Der, gewälzt von Berg zu Bergen,
Durch die Sachsendörfer sprühte.

. . .

17 Etendiĝis kampoj, forstoj
de la kort' ĝis malproksimo,
estis akvoj kaj montfirstoj
de l' pratemp' terena limo. -

18 Kiam la popolmigradoj
ŝtormis el la oriento
tra l' germanaj kampoj kiel
sur la maro ega vento,

19 kiam el la nordo suden
iris la sukcenfiŝistoj,
la romiajn valoraĵojn
rabis la Spesart-ĉasistoj,

20 kiel firmaj kverkoj sidis
sur liberaj grundoj tie
tiu nobla Saksa gento,
vivis ĉiam tradicie.

21 Kultivadis ili agrojn,
paŝtis ŝafojn sur paŝtejoj,
zorge bredis ili bovojn
kaj ĉevalojn sur herbejoj;

22 laŭ prapatra mor' ekzercis
salton, ĵeton kaj defendon,
prenis tuj armilon feran,
venĝi krimon aŭ ofendon;

23 faris ili medon sian,
ĉasis en arbaroj spite,
servis ĉe ofer-kaldronoj
la malnovajn diojn rite.

24 Sur la Akcipitra korto,
en la domo familia,
loĝis jam la Falkaj filoj
longe, unu post alia,

25 Maldisturbe kaj honore,
ĝis ĉe l' Rejno incendiĝis
brulo, kiu mont-al-monte
tra Saksujo traruliĝis.

. . .

26 Krieg mit Karl! Die Mütter klagten.
Krieg! Es freuten sich die Aare;
Krieg den Göttern, Krieg den Menschen,
Krieg durch dreißig lange Jahre!

27 Alfrik, Elmars Vater, brachte
Wunden heim und bitt're Schmerzen,
Heiße Wunden, tiefe Wunden,
Doch die tiefste saß im Herzen.

28 Machtlos, rechtlos war der Sachse;
Dreist, wie auf die müden Flanken
eines speerdurchbohrten Ebers,
Trat auf ihn der Fuß des Franken.

29 Irmintrud, die Gattin, mischte
Kundig all der holden Kräfte,
Die in Frucht und Blüte schlafen,
Sanftes Öl und milde Säfte.

30 Swanahild, die greise Drude,
Ritzte Runen, Zauberzeichen,
Warf die Stäb' und raunte Sprüche,
Gram und Siechtum zu verscheuchen.

31 Lindern mögen Wurz und Worte
Wundenweh und Herzbeschwerde;
Bester Arzt für jeden Jammer
Ist die stille, kühle Erde. -

32 Auf den Sohn, den frühverwaisten,
Sah die Mutter oft mit Zähren:
"Kind, wer wird in Ernst und Liebe
Dich belehren und dir wehren?"

33 Tief ins junge Leben grub sie
Tiefen Abscheu vor dem Neuen,
Mocht' ihr Bruder an der Pader
Mit dem Bischofsstab auch dräuen,

34 Badurad, der eifervolle,
Den es schmerzte und empörte,
Daß sein eignes Blut dem Kreuze
Starren Sinns den Rücken kehrte.

...

26 Ho, milit' kun Karl', la Franko!
Ho, milit'! Patrinoj plendis.
Ho, milit'! Dum tridek jaroj
sin Saksujo ja defendis!

27 Tre vundiĝis en batal' la
patro de Elmar', doloro
lin turmentis tre, sed plie
tiu vundo en la koro.

28 Senpotenca kaj senrajta
estis nun la Saks', la Franko
tretis lin samkiel lacan
apron kun borita flanko.

29 La edzino, kiu konis
multajn kaj sanigajn teojn,
el folioj kaj el floroj,
miksis sukojn kaj oleojn.

30 Druidin' murmuris vortojn,
gratis runojn, sorĉajn signojn,
por forigi la malsanon
ĵetis ŝi la fagajn lignojn.

31 Per radikoj kaj per vortoj
mildigeblas ja sufero,
sed plej bona kuracilo
estas tombo en la tero. -

32 Plore la patrino diris
al la knabo orfa frue:
"Kiu ame, serioze
vin edukos nun instrue?"

33 Abomeni la novaĵojn
ŝi instruis al l' infano,
kvankam ŝin minacis ŝia
frato, episkop', kristano.

34 La fervora frato, kiun
indignigis kaj doloris,
ke fratin' rigidanime
de la kristanismo foris.

...

35 Und im Wald die greise Drude
Pries den Heldenruhm der Ahnen;
Götter fürchten, Franken hassen,
War ihr unablässig Mahnen. -

36 Knabenzucht will harte Hände,
Bald entsandten sie zum fernen
Bruderstamm den vaterlosen,
Maß und Männerbrauch zu lernen.

37 Gastverwandt dem Haus der Falken,
Welterfahren, weitgepriesen,
War der graue Wodanspriester
Thiatgrim im Land der Friesen.

38 All der ernsten Nordlanddenker
Weisheitsfülle war ihm eigen;
Beides wußt' e: klug zu reden,
Und was klüger, klug zu schweigen.

39 Elmar staunte, wenn der Alte
Ihn die Runenrätsel lehrte,
Wenn er ihm gedankenreicher
Sprüche tiefen Sinn erklärte:

40 Donars Kämpfe mit den Thursen,
Walas düstre Prophezeiung,
Balders Tod, die Götterdämmrung,
Weltvernichtung, Welterneuung;

41 Oder wenn er ihm entrollte
Meerumrauschte Gudrunsagen,
Siegfrieds Tod, Kriemhildens Rache
Und den Zorn des grimmen Hagen.

42 Eins nur war Beginn und Ende:
"Sonder Wanken, sonder Schwanken
Fluch und Haß dem welschen Feinde,
Fluch und Haß dem Gott der Franken!"

43 Jahre flohn, der blonde Knabe
War zum Jüngling aufgeschossen,
Stark und stattlich, still, doch glühend
Offnen Auges, doch verschlossen.

...

35 La arbara druidino
la heroojn ne forgesis,
diojn timi kaj adori
admonadi ŝi ne ĉesis. -

36 Knabeduk' postulas duron.
Sendis oni en la foron
al fratgento la orfulon,
por ellerni viran moron.

37 Gastparenca al la Falka
domo estis Tiatgrimo,
pastro de Votan', loĝanta
en marborda malproksimo.

38 Estis propra al ĉi tiu
la nordlanda pensopleno,
sciis tiu diri ion
aŭ nenion laŭ konveno,

39 runojn montris al Elmaro,
aŭskultanta kun admiro,
kiam li klarigis sencon
de tre saĝa iu diro.

40 Pri profetaj vortoj mornaj,
pri batalo de Donaro,
di-pereo, mond-novigo
li rakontis al Elmaro.

41 Li rakontis la sagaojn
pri Gudruno, la reĝino,
pri la morto de Sigfrido
kaj la venĝ' de Krimhildino.

42 Je l' komenco, je la fino,
ĉiam diris li nur tion:
"Ni malbenu kaj malamu
tiun Frankon, ties dion!"

43 Jaroj pasis, plenkreskinta
estis jam la knab' Falkida,
maldirema kaj trankvila,
tamen ankaŭ sciavida.

...

44 Träumend blickt' er oft vom Strande
In des Meeres graue Wogen,
Träumend nach den Kranichschwärmen,
Die im Herbst gen Mittag zogen.

45 Dacht' er an das Los der teuern
Unterjochten Heimaterde?
An die Mutter, wie sie einsam
Trauernd saß am öden Herde?

46 An ein kleinee Frankenmädchen,
Das gerettet einst der Knabe
Mit Gefahr des eignen Lebens
Aus des Weihers feuchtem Grabe?

47 Das mit Lachen und mit Weinen
Auf den Wangen Blässe, Röte,
Küssend ihn umschlang und leise
“Elmar, sag es keinem!” flehte?

48 Zwar die Lippe war versiegelt
Und gebannt von sußem Munde,
Doch im Herzen, tief im Herzen
Rief es immer: “Hildegunde!” -

49 Thiatgrim, der Graubart, murrte:
“Ist der Falk des Käfigs müde?
Will ihm länger nicht behagen
Meines Hauses träger Friede?

50 Dort zum Normann mag er fliegen:
Thorkell rüstet Krieg den Franken,
Und sein Flügeldrache badet
In der Bucht die finstern Flanken.“

51 Wikingsfahrt zum Frankenlande?
Rachekampf? Wie Elmar lauschte,
Wie er schnell das Lodenkoller
Mit dem Kettenhemde tauschte!

52 Lustig war's, in Sturmesbrausen
Auf dem Wellenroß zu reiten
Sommerlang, und Wund' und Wunde
Mit dem Landesfeind zu streiten.

...

44 Ofte li rigardis sonĝe
en la ondojn de la maro,
revis rigardante, kiam
suden flugis grua aro.

45 Ĉu li pensis je la kora
mallibera hejma tero?
Je l' patrino jen sidanta
ĉe la forno sen espero?

46 Je malgranda knabineto,
kiun estis li savinta
el laget', en kiun estis
tiu tiam enfalinta?

47 Kiu lin brakumis ride;
pala, ruĝa kaj plorante,
lin kisante: “Ho Elmaro,
ne malkaŝu ĝin!” dirante?

48 Sigelitaj estis liaj
lipoj ja de la knabino,
sed la koro ĉiam vokis:
“Hildegundo, karulino!” -

49 Tiatgrim', la griza, diris:
”Ĉu la Falko estas laca
de la kaĝ', ne volas resti
plu en mia domo paca?

50 Flugu al Torkelo, kiu
nun atakas tiujn Frankojn;
en haveno la drakŝipoj
banas ja la sombrajn flankojn.”

51 Al la Frankoj kun Vikingoj?
Ŝipveturo venĝoprena?
Kiel li rapide ŝanĝis
veston kun ĉemizo ĉena!

52 Gaje estis en ŝtormbruo
rajdi sur la ondĉevalo
dumsomere, vund' je vundo,
sin mezuri en batalo.

...

53 Wonnig war's, im Föhrensaale
Winters mit den Bankgenossen
Kämpenweisen still zu horchen,
Die vom Mund des Sängers flossen.

54 Stumm bei Frauen war der Sachse,
Kühn in Not und Männerfehde,
Klug im Rat, am Tisch bescheiden
Mit dem Trinkhorn, mit der Rede.

55 Manches schöne Nordlandsmädchen
Sah ihm nach mit holden Blicken,
Schritt er, hoch den Kopf, vorüber,
Ohne nur zum Gruß zu nicken.

56 Thoralill, des Wikings Schwester,
Stickte Laub- und Blumenranken
Ins Geweb' und mit den Blumen,
Mit den Blättern viel Gedanken.

57 Kleine Thora. laß das Träumen,
Falkenart hat schnelle Flügel;
Glaubst du ihn an sichrer Kette,
Schweift er über Tal und Hügel.

58 Hastig über Tal und Hügel
Flog er heim, ihn rief der Bote
Hastig zu der kranken Mutter;
Was er fand, war eine Tote.

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas FRIEDRICH WILHELM WEBER *(Frederiko Vilhelmo Vebero, ∗1813-12-25 – †1894-04.05).*

Arg-117-232 (2015-02-11 18:29:02)

53 Ja plezuris sidi vintre
kun kunuloj en pinhaloj,
aŭdi kantojn de kantistoj
pri herooj kaj bataloj.

54 Saĝa estis jena Sakso
en kverelo virdisputa,
sin detenis de drinkado,
ĉe virinoj estis muta.

55 Kelka bela nordanino
lin rigardis simpatie,
kiam li sen kapsaluto
preteriris mute ie.

56 La fratino de l' vikingo
brodis florojn kaj foliajn
ornamaĵojn en teksaĵon,
kaj kun tiuj pensojn siajn.

57 Ĉesu revi, knabineto!
Falk' ne restas sur la tero.
Se vi kredas lin kaptita,
ĝi jam flugas en aero.

58 Haste flugis li jam hejmen,
oni estis lin vokinta
al malsana la patrin;
sed li trovis ŝin mortinta.

Traduko de la Germana poemo "Dreizehnlinden, Kapitel 3, Auf dem Habichtshofe" de FRIEDRICH WILHELM WEBER *(Frederiko Vilhelmo Vebero, ∗1813-12-25 – †1894-04.05) en Esperanton de* MANFREDO RATISLAVO *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04).*

Arg-117-233 (2015-02-11 18:36:37)